# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 58, Numero 12, decembro 2023*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**


## Zamenhof-festo 2023

*Nicole Else, sekretario de EFNSK*



Unue ni aŭskultis prelegon pri la vojaĝo de Joanne Cho al Italio. Ŝi ĉefe klarigis, kial Italio similas al Koreio.

Unuavide vi povus pensi, ke ne estas similecoj inter tiuj 2 landoj, sed ja estas.

Poste ni manĝis tajlandan manĝaĵon kaj bongustan kukon en la formo de Esperanto-flago.



Sekvis ludo "Ĉu vi bone kapablas mensogi?" En tiu ludo vi devas diri 3 faktojn pri ne kutimaj okazaĵoj en via vivo, sed nur unu el ili estas vera. La aliaj personoj povas fari demandojn por havi pli da informoj kaj provi diveni kiuj eldiraĵoj estas malveraj.



La rezulto estis, ke ni ja havas bonajn mensogantojn. La ĉeestantoj ne bone sukcesis diveni kiuj eldiraĵoj estas veraj kaj kiuj ne.

Poste Rainer Kurz prelegis pri la germana urbo Stuttgart kaj Dmitry pri sia longa vojaĝo ĉirkaŭ Aŭstralio. Restis tempo por simple babili.

## Anonco:

## Esperanto NSW denove ofertas somerkursaran subvencion por membroj

*Jonathan Cooper, prezidanto de EFNSK*

Inter la 5a kaj 14a de januaro, okazos la Aŭstralia Esperanta Kongreso kaj Somerkursaro en la historia urbo, Ballarat. Dum ok tagoj, vi povos plibonigi vian Esperanton, spekti prezentadojn kaj prelegojn, viziti vidindaĵojn, kaj societumos. Esperanto NSW ofertas al membro oportunon partopreni sen aliĝkosto (normale $250).*




**Kio okazas dum kongreso kaj somerkursaro?**

Preskaŭ ĉiutage post matenmanĝo, okazas kursoj je du niveloj (progresintoj kaj spertuloj**). Post tagmanĝo estas prelegoj kaj paroladoj, kaj post vespermanĝo, diversaj agadoj, kiel teatraĵoj, muziko kaj ludoj. Unu tagon okazas plentaga ekskurso. La lasta manĝo estas speciala bankedo, kiam premioj estas disdonataj.

Kroma agado dum la semajno estas fotokonkurso. Kongresanoj estas invitataj fari fotojn de la kongreso kaj sendi ilin al la taksanto. Estas premioj 1a, 2a kaj 3a, kaj unu por la populara elekto.

La instruistoj por la kursoj estas Orlando Raola de Usono, kaj Hoan Trần de Vjetnamio.

Orlando E Raola estas doktoro, kemiprofesoro, kaj aktiva esperantisto. Li estis prezidanto de la Usona Esperanto-Asocio kaj estrarano de UEA, kaj nun estas membro de la Akademio de Esperanto.

Hoan Trần (Ĝojo) laboris dum la lastaj 12 jaroj en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, okupis diversajn rolojn en Esperanto-organizoj, kaj nuntempe studas interlingvistikon en Pollando. En Vjetnamio, ŝi ĉefe instruas Esperanton kaj helpas alilandajn instruistojn.

**La kongresejo**

La kongresejo estas Federation-Universitato en Ballarat.

Ballarat estas la historia koro de Viktorio, kaj estas fama pro sia ĉefa rolo en la orimpetego de la 1850aj jaroj. Kun okulfrapaj heredaj arkitekturaĵoj kaj vivanta muzeo, kiu kaptas la fervoron de tiu epoko, tiu urbo ofertas vidon en la aŭstralian pasintecon, nur horon kaj duonon for de Melburno.

**Por pli da informo**, kaj aliĝi, vizitu esperanto.org.au/kongreso.

**Por peti pri la subvencio**, simple skribu al nsw@esperanto.org.au kaj ekspliku kial vi volas partopreni, kaj iom pri via financa situacio.

* La gajnanto ankoraŭ devus pagi por vojaĝado kaj loĝado.

** Eble okazos kurso por komencantoj, se necese.

## Feliĉan 2024

*Dmitry Lushnikov, direktoro de EFNSK*




Mi dankas ĉiujn kiuj helpis krei kaj legis Telopeojn dum 2023. Mi deziras al vi feliĉan novan jaron, suksesojn kaj bonan sanon.

EFNSW: Esperanto Domo
Kontaktu Jonathan Cooper: 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm;  Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320  *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo: 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Luŝnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |
| Estraranoj: | Adam Levy, Terry Manley |

